


BULA EKLEZIASTIKA N-RO 002

PRI ALVOKO AL LA SOLENA DISERVO OKAZE DE LA NASKIĜTAGO DE LIA IMPERIA MOŜTO LA REĜO DE LA ATLIA IMPERIO, DON HIERONIMO LA 2-A.

AŬGUSTO I
Episkopo de Nisea.

Al la fideluloj kaj kredantoj de la Eklezio de Nisea, gracoplena saluton en Kristo.

Per mia aŭtoritato kiel la Ĉefo de la Eklezio de Nisea, mi proklamas Specialan Diservon por festi la naskiĝtagon de Lia Moŝto la Reĝo.

La liturgia ordo estos:

1. **La Granda Litanio.**
2. **Anglikana Rozario (Nia Patro kaj *Kyrie*).**
3. **Kolekto por Lia Moŝto la Reĝo:**

    a. **Ho Sinjoro, nia ĉiela Patro, alta kaj potenca, Reĝo de reĝoj, Sinjoro de sinjoroj, la sola Reganto de princoj, kiu de Via trono rigardas ĉiujn loĝantojn de la tero; Ni humile preĝas, ke Vi per Via graco rigardu nian plej gracan Suverenan Sinjoron, Reĝon Hieronimo la 2-a; kaj tiel plenigu lin per la graco de Via Sankta Spirito, ke li ĉiam kliniĝu al Via volo, kaj iru laŭ Via vojo: Plenigu lin abunde per ĉielaj donacoj; donu al li longan vivon en sano kaj prospero; fortigu lin, por ke li venku kaj superu ĉiujn siajn malamikojn; kaj fine, post ĉi tiu vivo, li atingu eternan ĝojon kaj feliĉon; per Jesuo Kristo, nia Sinjoro.**

    Amen.

Simile, ĉiu fidelulo, kiu deziras diri preĝon, benon aŭ admonon post la fino de la meso, rajtas fari tion, laŭ peto al la celebranto de la diservo.

Donita en la Centra Distrikto de Nisea, la 6-an de septembro 2025.

DEUS SEMPER TECUM SIT.